

La Bulteneto

Numero 75 - Esperantojaro 138



Nummer 75 - Jahr 2024

DULINGVA MAGAZINO ELDONATA EN VIENO

ZWEISPRACHIGES MAGAZIN AUS WIEN



Aggstein – La Vultura Nesto

Aggstein – Das Geiernest

La Bulteneto

Numero 75  Esperanto-jaro 138

Aliaj numeroj kiel pdf: bitoteko bulteneto

Redaktejo - eldonejo - presejo:

Rudolfnergasse 8/11, 1190 Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio

Tekstoj: Renate kaj Walter Klag

esperanto@chello.at

Unverkäufliche, private Ausgabe - Nevendebla, privata eldono


Sur la titolpaĝo

La burgruino Aggstein [agŝtajn]



Rigardo okcidenten. Sube Danubo kaj la valo Wachau [vaĥáŭ]

Foto Vikipedio

Wachau [vaĥáŭ] estas 36 km longa trarompa valo de Danubo en Aŭstrio, 100 km okcidente de Vieno, inter Melk (nivelo de Danuba surfaco 210 metroj super marnivelo) kaj Krems (190 metroj). Ambaŭflanke de Danubo estas la ĝis 1000 metrojn altaj gnejsaj montoj de Arbara Kvartalo, norde Jauerling (960 m), sude Mühlberg (725 m). Pro la milda klimato homoj setlis tie jam en la ŝtonepoko. La plej konata atestanto pri tio estas la mondfama statueto "Venuso de Willendorf", kiu aĝas ĉirkaŭ 29 000 jarojn. Multaj urboj kaj vilaĝoj sur la suda bordo devenas de romia koloniigo antaŭ preskaŭ 2000 jaroj. Sur la norda bordo la vilaĝoj kaj urboj estas fonditaj ekde la naŭa jarcento, interalie Willendorf [vilen-vilaĝo] je la maldekstra bordo de Danubo.



Wachau - Österreichischer Atlas, Verlag Hölzel, Wien 1978, Seite 18



Aggstein sur OpenStreetMap

La burgo Aggstein [agŝtajn] konstruiĝis en la 12a jarcento.

Ĝi situas je la dekstra bordo de Danubo, 300 m super Danubo.

Koordinatoj: 48.3058388 norde, 15.4082461 oriente.

Ekde la jaro 1181 Kuenringer estis la posedantoj de la burgo. Ili ribelis kontraŭ la hercogo Frederiko la Dua. Tiu sieĝis kaj konkeris la burgon. Plia sieĝo kaj konkero okazis 1296. Post la morto de la lasta Kuenringer la burgo ruiniĝis.

Hadmar la Tria de Kuenring (\approx 1185 – 1231) kaj ties filo tre arbitre kontrolis la ŝipojn sur Danubo. Ili ricevis la kromnomojn Rabokavaliroj kaj Hundoj de Kuenring. Iam ili baris Danubon per fera ĉeno kaj kaptis ŝipon. Kiam hercogo Frederiko aŭdis tion, li volis konkeri la burgon, sed vane. Tial li uzis ruzon: Li sendis la Vienan komerciston Rüdiger, kiu estis jam ofte elrabita de Hadmar, al Regensburg, 300 km Danubon kontraŭflue. Tie Rüdiger preparis fortikan ŝipon, kiu portis valoran ŝarĝon kaj kaŝitajn soldatojn. Ĉe Aggstein Hadmar haltigis la ŝipon kaj persone inspektis la valoraĵojn. En tiu momento la soldatoj kaptis Hadmaron kaj transportis lin al Vieno. La hercogo devigis Hadmaron redoni la rabaĵojn kaj bonigi la damaĝojn.

1429 Georg „Jörg“ Scheck von Wald (Georgo Ŝek de Arbaro) ricevis la ruinojn kiel feŭdon de la hercogo Albrecht [albreĥt] la Kvina. Georgo devis rekonstrui la burgon kaj sekurigi la navigacion sur Danubo. 1438 Georgo ricevis la rajton enkasigi doganon, sed devis bonteni la haŭlovojojn je la dekstra bordo de Danubo, sur kiuj ĉevaloj tiras ŝipojn kontraŭflue. Dum la sekva tempo Georgo iĝis rabo-kavaliro, kiu elrabis

la ŝipojn. Tial li ricevis la nomon Jörg Schreckenwald [jerg ŝrekenvald], tio signifas Georgo Timo de la Arbaro.

Jörg Scheck von Wald (Jerg Ŝek de l'Arbaro) kaj la rozĝardeneto

La rozĝardeneto estas natura roka platformo, parto de la burga roko, kaj estas ĉirkaŭita de vertikalaj deklivoj. Laŭ legendo Jörg tien metis kaptitojn, kiuj havis nur du eblecojn: Morti pro malsato kaj soifo aŭ salti suben. Dufoje saviĝis kaptitoj, kiuj saltis sur la suprojn de arboj. Je la dua fojo sonoriloj el preĝejo pli sube tiel laŭte sonoris, ke Jörg freneziĝis kaj estis venkita fare de Georg von Stain [fon ŝtajn].

1529 la osmanoj sieĝis Vienon. Kelkaj osmanoj venis ĝis Aggstein kaj bruligis la burgon.

2004 Oswald Graf von Seilern-Aspang kaj la federacia lando Malsupra Aŭstrio investis multe da mono por renovigi la ruinon kaj adapti la enirejon. Oni instalas elektroprovizadon, akvodukton kaj kanalon. La kavalira salonego ricevis tegmenton. Aktuale pli ol 50 mil turistoj jare vizitas la burgon.

Fama grafitiisto Kyselak

Josef Kyselak [kíselak] naskiĝis 1798 en Vieno. Li estis alpinisto kaj laboris kiel oficisto por la imperiestro Francisko la Unua. Kyselak iĝis fama pro la rimarkinda kutimo en multaj lokoj skribi sian nomon per grandaj majuskloj. Tial li estas pioniro de la grafitio-kulturo. 1831 li iĝis viktimo de la dua ĥolero-epidemie.

Joseph Victor von Scheffel

Joseph Victor von Scheffel [jozef viktor fon ŝefel], tre populara verkisto kaj poeto en la 19a jarcento, naskiĝis 1826 en Karlsruhe, kie li mortis 1886. Li estis unu el la kreantoj de la termino Biedermaier (Bidermajro). Laŭ la deziro de sia patro li studis juron, germanan filologion kaj literaturon en Munkeno, Hajdelbergo kaj Berlino. Tiam li estis membro de studentaj organizoj.

Lia financa situacio permesis al li okupiĝi pri pentrado kaj verkado. Liaj studente-freŝaj kaj impertinentaj poemoj kaj humuraj kantoj igis lin tre fama.

Der Aggstein

Joseph Victor von Scheffel

In: *Gaudeamus. Lieder aus dem Engeren und Weiteren* (1868)

Inschritftafel am dritten Tor der Burg:

... das purcstal hat angvangen tze pawen her Jörig der Schrekk von Wald,
des nechsten mantag nach unser Fraun tag navitatis,
da von Crist gepurd warn ergangen MCCXXVIII

Nun die ersten Lerchen stiegen
Und der Himmel freundlich lacht,
Hab' auch ich zu neuem Fliegen
Wanderfroh mich aufgemacht.

Dir gilt's heut, Kuenringer Feste,
Aggstein, wetterbraun und rot,
Der gleich einem Geierneste
Auf die Wachau niederdroht.

Leicht ist Einlaß zu gewinnen,
Kein Gewaffen sperrt den Pfad
Und kein Hornstoß von den Zinnen
Meldet, daß ein Wanderer naht.

Linder Frühlingsluft erschlossen
Stehn des Burgstalls Trümmerreih'n,
Und Jerg Schreckenwalds Genossen
Reiten nicht mehr aus und ein.

Hoch im Innern schlüpft ein Pförtlein
Auf den freien Fels hinaus
Und ein schaurig schmales Örtlein
Überrascht mit starrem Graus.

Rosengarten ist's geheißen,
Doch vieldeutig klingt das Wort,
Nur die dornig wilden weißen
Todesrosen blühen dort.

Mancher stand hinausgestoßen
Auf der Kuppe steilem Rand,
Bis ihn Sturm und Wetterosen
Und der Hunger übermannt;

Mancher, seine Qual zu kürzen,
Zog den Sprung zur Tiefe vor,
Wo zerschellt in jähem Stürzen
Bald sich sein Gebein verlor.

... Schwer empört schau' ich das wilde
Denkmal wilder Menschenart ...
Sieh – da winkt versöhnlich milde
Auch ein Gruß der Gegenwart:

Schwindlig ob des Abgrunds Schauer
Ragt des höchsten Giebels Zack,
Und am höchsten Saum der Mauer
Prangt der Name – KISELAK.

Aggstein

Transponita fare de Renate Klag

Nun unuaj alaŭdoj sin levis
Kaj ĉielo serene ridas,
Ankaŭ mi – kun migra em'
Preparis min al vigla ekir'.

Nun ek al vi Kŭenringa Burgo
Aggstein, veterobrone ruĝ',
Kiu kiel vultura nesto
Sur Wachau minace tronas.

Facile estas akiri eniron,
Neniu armilo baras vojon,
Neniu kornblovo de sur kreneloj
Anoncas vojaĝanton alirant'.

En milda printempa aer' alirebla
Staras kastelaj ruinoj vice,
Kaj kamaradoj de Jerg Tim-arbaro
Ne plu rajdas en kaj el.

Alt-interne eta pord' eksteren
Al kalva roko gvidas
Tie timige eta loko
Surprizas per rigidiga horor'

Rozĝardeno ĝi nomiĝas,
Sed ambiguas la nom' eŭfonie
Nur dornaj sovaĝaj blankaj
Mortorojoj floras ĉi-tie.

Kelkiu staris elpuŝita
Sur rand' de la kruta dekliv',
Ĝis ŝtormo kaj tondrado
Kaj malsato venkis lin.

Kelkiu por ĉesig' de l' turment'
Preferis plong' al profund',
Kie post frakasa falo
Liaj ostoj disis for.

... Grav-furioza min vizias sovaĝ'
Monument' de barbar-homar'...
Vidu – tie signas pac-pardoneme
Ankaŭ saluto de l' nuntemp':

Kapturnigita pro abisma horor'
De plej alta first' elstaras gabla cak'
Kaj sur plej alta rando de l'mur'
Blazonas la nomo – KISELAK.

Transponita el la germana fare de Renate Klag.

Kun ideo de Stefano Klag.

Cak', germane „Zack“ [cak], signifas akra denta pinto (zackige Spitze).



La interna burgo.
En la mezo la kapelo.
Dekstre, kun barilo, la fama rozgardeneto.